

Eduard Stettler estus centunu-jara
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 451, 1981.02.05 & 07

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Dum prelegserio ni prezentis al vi la personecon de Hector Hodler, citante el liaj artikoloj aperintaj en la revuo "Esperanto". Fakte en sia iom utopia kaj antaŭ ĉio malfacila strebado starigi Universalan Esperanto-Asocion, Hector Hodler sukcesis venke, ĉar lin helpis komplementa kunlaboranto, kies nomon oni bedaŭrinde tendencas forgesi. Tiu ĉi raciema organizanto, nelacigebla kaj humila librotenanto donis al UEA firman fundamenton. Li nomiĝas Eduard Stettler.

A.- Se li ankoraŭ vivus, ĝuste tiun ĉi semajnon Eduard Stettler fariĝus centunu-jara.

Cl.- Eduard Stettler naskiĝis la 5-an de februaro 1880 en Berno. Lia patro, Eugen Stettler estis advokato kaj la patrino bedaŭrinde mortis tre juna, je sia 25-a jaraĝo.

A.- La familio Stettler, kiu devenis de la vilaĝo Stettlen, kiu situas inter Berno kaj Thun, apartenis al la klaso de la reg-kapablaj familioj, kiuj gvidis ĝis la revolucio de 1789 la aferojn de la urbo kaj de la ŝtato Berno.

Cl.- Materie sendependa, Eduard Stettler neniam bezonis pergajni sian vivon. Sed tio ne malhelpis lin multe labori. Juron li studis en la universitatoj de Berno kaj Heidelberg. "Li estis ano de la Zofingia, studenta societo, de kiu eliris multaj eminentuloj en scienca kaj politika vivo. Jam estante studento montriĝis la esencaj trajtoj de "lia pacema karaktero. La societon "minacis disiĝo" Eduard Stettler "trovis konvenan bazon por ke re rewstu la unueco de la societo." (Hans Jakob, Esperanto 486)

A.- Eduard Stettler ne edziĝis. Li sin komplete dediĉis al movadoj, kiuj reprezentis liajn vivcelojn. Inter ili Esperanto okupis ĉeflokon. Liaj aliaj okupoj estis la luktado kontraŭ la alkoholismo, la muziko, societo "Metallharmonie", kaj ĉefe bonfara societo interhelpa, kiun en sia nekrologa artikolo Hans Jakob nomas Gildo.

C1.- Eduard Stettler estis pasia automobilisto, kiu ne nur kapablis stiri, sed kiu konis ĉiujn sekretojn de la motor-mekaniko.

A.- Li esperantiĝis en 1908, partoprenante kurson, kiun gvidis Jakob Schmid. Li tuj entuziasmiĝis por la lingvo kaj idealo Zamenhofa kaj por la laboro, kiun Hector Hodler plenumis en Ĝenevo, favore al la kreo de UEA. En sia libro pri Hodler, Eduard Stettler bone priskribas la modestecon de la UEA-oficejo en Ĝenevo kaj la administre ne tre racian laboron de Hodler. Ni citas :

Cl.- "La supron de la gloro de tiu organiza periodo UEA atingis dum somero 1909. Ne malpli ol ok memstaraj fakoj gvidataj el diversaj lokoj. Administrado: Hodler, Genève; Financoj: Rousseau, Beaune; Konsuloj: Carles, Béziers; Oficejoj: Blaise, London; Turismo: Schmid, Bern; Komerco kaj Industrio: Kandt, Bromberg; Junuloj: Rockmann, Magdeburg; Aerveturado: Roy, Moresnet-Neutre.

A.- "Plie troviĝas en la listo: Alta Konsilantaro, je kvin membroj; Jura konsilantaro, kun trimembra komitato kaj naŭ vicprezidantoj; la diversspecaj Delegitoj, Konsuloj ktp.

Cl.- "Oni havis insignojn, oficialan leterpaperon, belajn kontojn por ĉiu Delegito laŭ spesmila sistemo, membrokartojn konforme al numerigado de la Bibliografia Instituto en Bruselo, kion vi volas plu?"

A.- "Por tia entrepreno dekduo da oficistoj estus ĝuste sufiĉintaj. Kion mi trovis alveninte en Ĝenevo por helpi Hodler'on? 21 skribis Eduard Stettler? " Ĉambro-keston malgrandan, je ordo kaj pureco en miaj okuloj dubaj, kun kelkaj krudaj abiaj tabloj kaj bretaro laŭlonge de unu muro. Ĉe la fenestro Hodler; unu oficisto rusa, inteligenta kaj malordema; en la malantaŭa fundo du pliaj samideanoj ne forigeblaj eternaj vizitantoj, kiuj per ĉiama babilado suposeble kredis inspiri la oficejon." (Fino de la citaĵo).

Cl.- Eduard Stettler, kun takto, transformis tiun ĉi iom improvizitan oficejon al bone funkcia administrejo. Jen kiel Hans Jakob priskribas tiun ĉi fazon de lia laboro:

A.- "Li ekagis. Sisteme kaj persiste li forigis ĉion kio ne taŭgis, de la babilemaj vizitantoj ĝis malpraktikaj aranĝoj. La teorie belegan dividon en laborfakoj kun fakestroj en malsamaj lokoj, oni enterigis. Komitato centra kun precize fiksitaj kompetentecoj prenis la ĝeneralan gvidon de la Asocio en manon. Kaj la Centra Oficejo en Ĝenevo fariĝis la firma punkto en la kunpuŝiĝo de deziroj kaj eblecoj.

Cl.- "Organizi, kalkuli, raporti, estis la cefaj okupoj de Eduard Stettler. Atestas pri tiu ĉi agado la sennombraj leteroj al Hodler kaj Hans Jakob. Konfirmas ĝin la presitaj raportoj de la unua kongreso de UEA en Augsburg 1910 ĝis la Statuto de 1933 (tiu ĉi provo kunigi malsamajn elementojn).

A.- "Dokumentas fine lian agadon la multaj principaj ŝanĝoj en UEA, neniam poste forlasitaj kaj transprenitaj de aliaj... Senpaga jarlibro kontraŭ deca kotizo; Garantia Kapitalo formita de atestoj kontraŭ dumviva membreco; regula informado pri agado al komitato kaj al la membraro.

Cl.- "Frue Eduard Stettler komprenis, ke tia movado, kies eroj dependas de tiom da faktoroj aferaj kaj personaj bezonas leĝaron. Kaj tiu ĉi leĝaro, la statuto sin apogu je Civila Leĝaro de lando libereca kaj societema. Simile kiel nia lingvo bazas sur Fundamento, angulŝtono de la konstruaĵo sur kiu evoluiĝu ĉio venonta, Eduard Stettler, fiksas statute rajtojn kaj devojn de la organoj kaj de la membroj de l'Asocio." Fino de la citaĵo.

A.- Hector Hodler kaj Eduard Stettler bone akordiĝis escepte koncerne la fumadon. Ni menci tiun ĉi problemon, denove citante el Hans Jakob:

Cl.- "Fervorega malŝatanto de ĉia alkoholaĵo, Eduard Stettler same fervore ŝatis la tabakon. Ĉiam mi vidas antaŭ mi Hodler'on kun sia kapo de Kristo suferanta pro la tabaknuboj en la oficejo."

A.- Neniu estas sanktulo!

Cl.- Apenaŭ oni konas la vivon de Hector Hodler. Ankoraŭ malpli konata estas tiu de lia kunlaboranto Eduard Stettler, kiu de 1910 ĝis 1919 estis vicdirektoro de UEA, direktoro de 1920 ĝis 1924, kaj prezidanto ekde 1928 ĝis 1934. Tiun ĉi jaron li rezignis, kiam Edmond Privat kaj Andreo Cseh ne estis elektitaj en la novan komitaton.

A.- Ankaŭ la svisa movado ŝuldas multon al li. Plurfoje li prezidis Svisan Esperanto-Societon.

Cl.- Ni esperas, ke foje historiisto provos malkovrigi al ni tiun ĉi vivon de sindonemo, al kiu Esperanto kaj aliaj idealoj tiom ŝuldas.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond prezentis la personecon de Eduard Stettler. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*